



# aktuala

## 34-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Gladly, cgladly@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono). Informoj: ...

<http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> [www.esperanto.be](http://www.esperanto.be) [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) <http://eo.eventeo.net>  
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

## ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri Bertha von Suttner
- Paĝo 3 - Esperantaj Eventoj
- Paĝo 4 - Akademio de Esperanto, Informo 11 pri landnomoj
- Paĝo 5 - Atestiloj kaj planlingvo "Lingvo de la Planedo"
- Paĝo 9 - Malferma Tago 30a en Roterdama CO de UEA
- Paĝo 10 - Flandra Leono kaj alia poemaro
- Paĝo 11 - Ana Lowenstein pri kapsikoj, paprikoj kaj pimentoj
- Paĝo 12 - Geraldo Mattos pri Mia Esperantisteco (dua parto)

## PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

### Majo 2009

- 6 Marc Demonty pri temoj de la euro-moneroj el ĉiuj landoj
- 13 Bernard-Regis Larue pri lastaj novaĵoj de la planedo Marso
- 20 Hélène Falk-Bracke proponas kvizojn por ĉiuj niveloj
- 27 Semajna kunveno

### Junio 2009

- 3 Georges Sossois pri la Belga Konstitucio
- 10 Claude Gladly (konfirmenda) pri sia agado en Cerfontaine
- 17 Lucien de Sujter rezignis prelegi pri BEFA pro memaj sanecaj kialoj
- 24 Semajna kunveno lasta antaŭ grupa ferio dum Julio kaj Aŭgusto

### Septembro 2009

- 2 Semajna kunveno unua post grupa ferio dum Julio kaj Aŭgusto
- 9 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 16 Semajna kunveno
- 23 Semajna kunveno
- 30 Semajna kunveno

## HÉLÈNE FALK-BRACKE PRI BERTHA VAN SUTTNER

*Bertha von Suttner estis la unua virino kiu, en 1905, ricevis la premion "Nobel" pri Paco.*

Ŝi estis batalanto por Paco kaj eldonis en 1889 libron titolitan « **Die Waffen nieder** » (For la armilojn - à bas les armes) kiu estas tiel grava por la pacmovado kiel « Uncle Tom's Cabin » (La case de l'oncle Tom) por la defendo de la usonaj nigraj sklavuloj. Aŭstrio honoras ŝin per la 2-eŭra monero, kiu reprezentas ŝian portreton.

Bertha von SUTTNER naskiĝis en Prago, en junio 1843, kiel filino de grafo Franz Joseph **Kinsky**, kiu forpasis dum ŝia edzino estis graveda. Kelkajn jarojn poste, Bertha kun sia patrino translokiĝis al Vieno. Ili ricevis alimenton de la familio Kinsky. Bertha ĝuis bonan kosmopolitan edukadon. Ŝi parolis perfekte 4 lingvojn: germanan, francan, italan kaj anglan. Ŝia patrino ŝatis iri de banloko al kuracejo, kio estis kutima en tiu epoko por mezeŭropaj riĉaj familioj. Tri fianĉiniĝoj finiĝis sen geedziĝo, kaj kiam ŝi estis tridekjaraĝa, do en 1873, ŝi iĝis edukistino ĉe la familio de **barono von Suttner**: kvar knabinoj kaj filo, Arthur, jam 23-jaraĝa. Iom post iom, de la kamaradeco inter la gejunuloj floris granda amo, ne aprezata de la gepatroj, kiuj sugestis al Bertha postenon kiel sekretariino de la industriisto **Alfred Nobel**, kiu tiutempe (1876) ekloĝis en Parizo kaj aperigis anoncon en pluraj lingvoj cele al dungo de sekretario. Bertha Kinski respondis en la samaj lingvoj. Alfred Nobel dungis ŝin tuj, sed antaŭ ol iri definitive Parizon, Bertha sekrete edziniĝis al Arthur von Suttner.

Ŝi devis esti tre ĉarma, ĉar ankaŭ Alfred Nobel tuj enamiĝis al ŝi, sed sen espero. Post kelkaj monatoj, Bertha reiris al Vieno sed restis en perleteraj rilatoj kun Alfred Nobel ĝis lia forpaso en 1896. Estas dirate ke estas sub ŝia influo ke Nobel aldonis premion por Paco al la aliaj premioj, kiuj rekompencas sciencistojn kaj verkistojn. Bertha kaj Arthur rifuĝis al Kaŭkazio, kie Bertha havis amikinojn. Naŭ jarojn ili loĝis en tiu regiono gajnante sian pervivaĵon per publikigado de priskriboj de vojaĝoj por Eŭropaj magazinoj kaj literaturaj revuoj. En la jaro 1885 okazas repaciĝo kun la gepatroj de Arthur kaj la paro revenas al Vieno, kaj vizitas Alfred Nobel en Parizo. Ili konatiĝas kun multaj interesaj kaj influhavaj personoj, kaj informiĝas pri internaciaj movadoj por Paco. Tiam Bertha decidis labori aktive por la Paco, kaj tuj verkas la romanon **Die Waffen nieder**, kiu aperas en 1889 kaj estas tradukita en 15 lingvojn. Ĝi estas pledo kontraŭ la absurdo de la milito. En 1891, Bertha fondas la Austran Pacsocieton. Dum la kvara mondpaca kongreso en Berno, en 1892, proponiĝas la fondo de Eŭropa Ŝtatunuiĝo, sed estas malakceptata. Alfred Nobel komentas « Miaj fabrikoj, kiuj produktas dinamiton, eble finos la militojn pli frue ol viaj kongresoj. En la tago, kiam du armeoj neniiĝos unu la alian dum unu sekundo, la homaro timos kaj forigos la trupojn ! » Sed tiu profetaĵo ne efektiviĝis.

En 1899 okazas en Hago (Nederlando) la unua packonferenco, al kiu partoprenas 26 ŝtatoj; Bertha von Suttner partoprenas en la Aŭstria delegacio. Sekve de tio, en Hago ekfunkcias konstanta internacia arbitracia tribunalo. Indas menciigi ke Bertha von Suttner estis ankaŭ favora al Esperanto. Ŝi mortis en Vieno en junio 1914, 71 jaraĝa kaj vidvino jam de 1902. Unu semajnon poste okazis la murd-atenco de Sarajevo...

Ĉefa fonto : artikolo de Walter KLAG el "La dua jarcento de Esperanto" n° 2 – 1997

Hélène Falk

Veteranoj de Esperantista Brusela Grupo daŭre kunvenas en la Kultura Centro de Dilbeek (Kamerijklaan 1700), por konversacia rondo, kutime je la tria aŭ kvara sabato ĉiumonate, ek de la 14a ĝis la 16a horo. Ĉiuj estas bonvenaj. Elektitaj datoj: 30/05; 27/06. Inter aliaj kunvenas la eksa prezidanto de EBG Emile Van Damme, Marc Demonty, Dina Deloyer, Philippe Van Damme, ktp.

## ESPERANTAJ EVENTOJ

En Esperantista Brusela Grupo, Cwik, Falk-Bracke, Amadori, Delforge prelegis aŭ gvidis kunvenojn en Aprilo, Demonty, Larue kaj denove Falk-Bracke agadas en Majo, Sossos, Glady, DeSutter estas programataj por Junio



Jara Kunsido de Belga Esperanta Federacio, 18 Aprilo 2009, en Loverval, Charleroi. Dekstre maldekstren: Paulo Branco, Eric Baert, Remy Sproelants, Francine Sperber, Diemante Aniciene, Marcel Delforge, Jean-Pol Sparenberg, Dina Deloyer, Raimond Steenhout, Lucien De Sutter, Georges Sossos, Claude Glady, Walter Van den Kieboom, Flory Witdoeck, Marc Cuffez



Reprezentantoj de Esperantista Brusela Grupo, Flandra Esperanto Ligo, Association Pour L'Espéranto, Belga E-Fervoja Asocio



Jan Amadori prezentis je la 22a de Aprilo interesajn kaprompilojn, ludenigmojn, puzzlejn



Juan Besada pri Kuba kaj UK 2010 en Havano, prelego je la 25a de Aprilo, Malferma Tago, Roterdama C.O. UEA, 65 vizitantoj



Kostjantin Demjanenko el Ukrainio prelegis je la 1a de Aprilo 2009 pri iĥtiologio en maro Azova, vera prelego pri fiŝo de Aprilo

## OFICIALA INFORMO N° 11 DE AKADEMIO DE ESPERANTO - 2009 04 15

### Listo de Rekomendataj Landnomoj kaj shanghoj en la statuto

La 15an de Marto 2009 la Akademio de Esperanto finis du voĉdonadojn. Unu temis pri Listo de Rekomendataj Landnomoj ellaborita de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro. La alia temis pri du shanghoj en la statuto de la Akademio. Estis aprobitaj kaj la proponitaj shanghoj de la statuto, kaj la proponita dokumento pri landnomoj. La nova Listo de Rekomendataj Landnomoj estas ghisdatigo kaj revizio de decido el 1989. Ghi entenas nomojn de chiuj nunaj landoj, kiuj estas membroj de UN, kaj ankoraŭ la nomojn de kelkaj pliaj landoj (inkluzive de tri landoj, kiuj malaperis au disighis post 1989). Jen mallongigita prezento de la rekomendataj nomoj:

Afganujo/Afganio; Albanujo/Albanio; Algherio; Andoro; Anglujo/Anglio; Angolo; Antigvo kaj Barbudo; Argentino; Armenujo/Armenio; Aŭstralio; Aŭstrujo/Aŭstrio; Azerbajghano; Bahamoj; Bangladesho; Barato (= Hindujo/Hindio); Barbado; Barejno; Belgujo/Belgio; Belizo; Belorusujo/Belorusio; Benino; Birmo; Bocvano; Bolivio; Bosnujo/Bosnio kaj Hercegovino; Brazilo; Britujo/Britio; Brunejo; Bulgarujo/Bulgario; Burkino; Burundo; Butano; Centr Afriko; Chado; Chehoslovakujo/Chehoslovakio; Chehujo/Chehio; Chilio; Chinujo/Chinio; Danujo/Danio; Dominika Respubliko; Dominiko; Ebur Bordo; Egiptujo/Egiptio; Ekvadoro; Ekvatora Gvineo; Eritreo; Estonujo/Estonio; Etiopujo/Etiopio; Fighio; Filipinoj; Finnlando; Francujo/Francio; Gabono; Gambio; Ganao; Germanujo/Germanio; Grekujo/Grekio; Grenado; Gronlando; Gujano; Gvatemalo; Gvineo; Gvineo Bisauo; Ghibutio; Haitio; Hindujo/Hindio (= Barato); Hispanujo/Hispanio; Honduro; Hungarujo/Hungario; Indonezio; Irako; Irano; Irlando; Islando; Israelo; Italujo/Italio; Jamajko; Japanujo/Japanio; Jemeno; Jordanio; Jugoslavujo/Jugoslavo; Kaboverdo; Kambogho; Kameruno; Kanado; Kartvelujo/Kartvelio; Kataro; Kazahhujo/Kazahhio; Kenjo; Kipro; Kirgizujo/Kirgizio; Kiribato; Kolombio; Komoroj; Kongo (Demokratia Respubliko Kongo, Kongo Kinshasa); Kongo (Respubliko Kongo, Kongo Brazavila); Kosovo; Kostariko; Kroatujo/Kroatio; Kubo; Kuvajto; Laoso; Latvujo/Latvio; Lesoto; Libano; Liberio; Libio; Lihhtenshtejino; Litovujo/Litovio; Luksemburgo; Madagaskaro; Makedonujo/Makedonio; Malajzio; Malavio; Maldivoj; Malio; Malto; Maroko; Marshaloj; Mauricio; Mauritio; Meksiko; Mikronezio; Moldavujo/Moldavio; Monako; Mongolujo/Mongolio; Montenegro; Mozambiko; Namibio; Nauro; Nederlando; Nepalo; Nigherio; Nighero; Nikaragvo; Nord Koreujo/Nord Koreio; Norvegujo/Norvegio; Nov Zelando; Omano; Orienta Timoro; Pakistano; Palauo; Panamo; Papuo Nov Gvineo; Paragvajo; Peruo; Pollando; Portugalujo/Portugaliao; Ruando; Rumanujo/Rumanio; Rusujo/Rusio; Salomonoj; Salvadoro; Samoo; Sankta Kristoforo kaj Nevis; Sankta Lucio; Sankta Vincento kaj Grenadinoj; Sanmarino; Santomeo kaj Principeo; Sauda Arabujo/Sauda Arabio; Sejšeloj; Senegalo; Serbujo/Serbio; Siberio; Sieraleono; Singapuro; Sirio; Skotlando; Slovaĵujo/Slovakio; Slovenujo/Slovenio; Somalujo/Somaliao; Sovetio, Sovet Unio; Srilanko; Sud Afriko; Sud Koreujo/Sud Koreio; Sudano; Surinamo; Svaizlando; Svedujo/Svedio; Svislando; Taghikujo/Taghikio; Tajlando; Tajvano; Tanzanio; Togolando; Tongo; Trinidad kaj Tobago; Tunizio; Turkmenujo/Turkmenio; Turkujo/Turkio; Tuvalo; Ugando; Ukrainujo/Ukrainio; Unuighintaj Arabaj Emirlandoj; Urugvajo; Usono; Uzbekujo/Uzbekio; Vanuatu; Vatikano; Venezuelo; Vjetnamujo/Vjetnamio; Zambio; Zimbabvo.

La statutaj shanghoj koncernas la regulojn pri reelektado de Akademianoj kaj la metodojn de voĉdonadoj, kiuj nun povas okazi ankaŭ per elektronikaj rimedoj. La novan version de la statuto kaj la plenan dokumenton pri landnomoj la Akademio baldau publikigos en sia TTT-ejo che: <http://akademio-de-esperanto.org>.

La Estraro de la Akademio de Esperanto interkonsente kun la direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro: John Wells, prezidanto, Brian Moon, vicprezidanto, Probal Dasgupta, vicprezidanto, Renato Corsetti, sekretario, kaj Bertilo Wennergren, direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

Redakcio transe skribas Zamenhof-sistemon anstataŭante supersignoj tra "-h", uzita de la aŭtoroj en interreto.

### PROJEKTO BUARQUE EN BRAZILA SENATO

Cristovam Buarque elstara brazila senatano, februare 2009 proponis oficialan devigan enkondukon de Esperanto en mezlernejo. La projekto ricevis laŭdon kaj akcepton de la Komisiono pri Edukado de Senato, supera ĉambro de la brazila federala parlamento. Senatano Marcelo Crivela, fama brazila evangeliisto kaj estro de menciita komisiono, redaktis favoran priskribo al la iniciato, sed poste li estis anstataŭata de senatano Mozarildo Cavalcanti, 64-jara kuracisto. [mozarildo@senador.gov.br](mailto:mozarildo@senador.gov.br)

## UNUAJ ATESTILOJ DISDONATAJ

Estis disdonataj en aprilo, unuaj atestiloj pri novtipa lingva ekzamensistemo de UEA, kies unuaj ekzamenoj okazis fine de 2008, laŭ regularo kontraktita kun Ŝtata Lingvoekzamena Centro en Budapeŝto, Hungario, konforme al postuloj de Konsilio de Eŭropo, al normoj de Komuna Eŭropa Referenckadro kaj al Asocio de Lingvotestistoj Eŭropaj.

ATESTILO PRI LINGVA EKZAMENO LANGUAGE EXAMINATION CERTIFICATE SPRACHPRÜFUNGSZEUGNIS CERTIFICAT D'EXAMEN DE LANGUE	
00007 Numero de la atestilo Serial Number Zeugnis-Nummer N° du certificat	00007 Numero de la atestilo / Serial Number Zeugnis Nummer / N° du certificat
Ni atestas, ke We hereby certify that Hiermit wird bestätigt, dass Nous confirmons que	ELTE Idegennyelvi Továbbképző Központ Exkzamena Centro Examination Centre Prüfungszentrum Centre d'examen
Paulo Antonio NEVES BRANCO Nomo / Name / Name / Nom et Prénom	ORIGÓ Lingva ekzamensistemo Examination System Prüfungssystem Examen
Alcobaca 04.10.1954 Naskiĝloko Naskiĝdato Place of Birth Date of Birth Geburtsort Geburtsdatum Lieu de naissance Date de naissance	Germanio Loko de la ekzameno / Examination Site / Prüfungsort / Lieu de l'examen
SUKCESE TRAPASIS LINGVOEKZAMENON ORIGO HAS SUCCESSFULLY PASSED THE ORIGO LANGUAGE EXAMINATION DIE ORIGO SPRACHPRÜFUNG ERFOLGREICH ABGELEGT A PASSÉ AVEC SUCCÈS L'EXAMEN DE LANGUE ORIGO	Düsseldorf 31.12.2008 Urbo Dato de la ekzameno Town Date of exam Stadt Prüfungstermin Ville Date de l'examen
	Lingvo / Language Sprache / Langue
	Nivelo / Level Stufe / Niveau
	Tipo / Type Typ / Type
	Esperanto supera (C1) kompleksa Esperanto advanced (C1) combined Esperanto Oberstufe (C1) kombiniert Espéranto supérieur (C1) complexe
	ausl. Prezidanto de UEA President of the World Esperanto Association Präsident des Esperanto Weltbundes Président de l'Association Mondiale d'Espéranto
	Directoro de la Ekzamena Centro Director of the Examination Centre Leiter des Prüfungszentrum Directeur du Centre d'Examen

Atestilo pri lingva ekzameno numero 007, nivelo supera C1, tipo kompleksa, dato 31.12.2008

## PLANLINGVO "LINGWA DE PLANETA"

Nova planlingvo raportata de Aloisio Sartorato en Rio de Janeiro, Brazilo kaj Germain Pirlot en Oostende, Belgio. Musklakante en la retejo <<http://www.lingwadeplaneta.info>> oni haveblas la klarigojn en lingvoj jenaj: *Arabi*, *Deutsch*, *English*, *Español*, *Esperanto*, *Farsi (Persa)*, *Français*, *Português*, *Русский (Rusa)*, *Zhongwen (Ĉina)*:

Lingwa de Planeta (kutima mallongigo LdP) estas planlingva projekto celanta kreon de internacia helplingvo. La lingvon planis, en Sanktapetroburgo, Dmitriĵ Ivanov, Jelena Ivanova, Asja Vinogradova kaj Anastasija Lisenko.

La fonetiko de LdP similas al Esperanto, sed ne entenas la fonemojn [v], [z], [ts] (kiel en "celo") kaj [Z] (kiel en "ajo").

La influo de Esperanto kaj Novial en la gramatiko de la projekto estas okulfrapa: "Fo unitaa de Arda!" = "Por la unueco de la Tero!". Krom Esperanto, oni povas vidi influon de la angla lingvo en la vortprovizo kaj de la rusa en la foresto de artikolo. Estas ankaŭ trajtoj de gramatiko de la kreolaj lingvoj (ekzemple Papiamentu): ne necesa uzo de la tempaj markoj kaj de pluralo. Laŭ la vortoj de la fondintoj, la ideo estas malpliigi la influon de latinidaj lingvoj. Pro tio la leksiko enhavas, krom eŭroplingvaj vortoj, ankaŭ ĉinajn, hindiajn kaj arabajn vortojn.

En sintakso, normala strukturo estas SVO (subjekto, verbo, objekto), sed oni povas ŝanĝi ĝin uzante la akuzativan vorteton "den".

La adjektivoj kutime finas per -e kaj ne varias laŭ nombro. La adverboj ordinare finas per -em. Verboj ofte finas per -i kaj ne varias laŭ persono, ofte ankaŭ laŭ tempo. La substantivoj kutime finas per -a aŭ -o kaj ne varias laŭ kazo, ofte ankaŭ laŭ nombro. Ne estas gramatika genro, kiam oni bezonas indiki la sekson oni uzas la sufiksojn -ina (-in-) aŭ -us (vir-), aŭ la partikloj man aŭ gin ("man" signifas "viro", "gina" signifas "virino"): koka = (ge)koko; kokina, gin-koka = kokino; kokus, man-koka = virkoko.

Specimenoj:

Personaj pronomoj: me = mi; ju = vi; lu = li; ela = ŝi; ta = li/ŝi, da = ĝi; ili = ili. La refleksiva estas swa.

Pri la prepozicioj, oni vidas zorgon similan al tiu en Ido al "pliprecizigo".

Nombroj: un = (1), dwa = (2), tri = (3), char = (4), fif = (5), sit = (6), sem = (7), ot = (8), nin = (9), shi = (10), shi-un = (11), shi-dwa = (12), dwashi = (20), trishi = (30), sto = (100), mil = (1000).

"tristo fifshi-sem" = 357.

Por formi ordajn nombrojn oni aldonu di: di un (unu), di dwa (dua)...

LdP es muy interes-ney lingwa. LdP estas tre interesa lingvo.

Vikipedio



Kreantoj de LdP en rusa urbo Sanktapetroburgo: Anastasia Lysenko, Asya Vinogradova, Elena Ivanova, Dmitry Ivanov

## AŬTORA RETEJO

Swaagat!

Bonvenon en la TTT-ejo de Lingwa de Planeta (la Lingvo de la Planedo)!

Swaagat estas hindia vorto, kiu signifas "bonvenon!". La duobla "a" indikas ne la longecon de la vokalo, sed eksterregulan akcenton.

Lingwa de Planeta (koncize LdP) estas nova tipo de internacia lingvo.

Ni kredas, ke nepre aperos monda universala lingvo, kiel harmonia tuto sur la bazo de la plej parolataj naciaj lingvoj. Ni kreas LdP-n kiel prototipon de tiu estonta monda interlingvo, elektante la karakterojn, kiujn ni konsideras devigaj por ĝi.

Lingwa de Planeta estas lingvo simpla kaj natureca, kiu estas kreita fundamente el la dek lingvoj plej parolataj en la mondo: ses eŭropaj lingvoj (**la angla, la germana, la franca, la hispana, la portugala, la itala**), kaj ankaŭ **la ĉina, la rusa, la hindia kaj la araba**. Tiel, LdP estos sentata de la plimulto de la planeda

loĝantaro ne nur kiel neŭtrala lingvo, sed ankaŭ kiel komuna lingvo kun ia gusto de iliaj naskiĝaj lingvoj. Psikologion ni konsideras tre grava: la elementoj de la naskiĝa lingvo en lingvo internacia vigligas pozitivajn emociojn, kaj konsiderinde pligrandigas la intereson lerni ĝin.

El kio konsistas la noveco de la LdP-projekto? El la tuto de la jenaj trajtoj: 1) konvinko pri la neevitebla proksimiĝo de la lingvoj de la Tero, kaj pri la naskiĝo de universala lingvo; 2) konvinko ke tiu universala lingvo estos aposteriora natureca planlingvo unuiganta la dek plej parolatajn lingvojn de la mondo, kaj inkluzivanta multajn ne-eŭropajn elementojn; 3) kreado de la LdP kiel prototipo por tiu monda lingvo.

Kiel rezulto, LdP malsimilas al preskaŭ ĉiuj aliaj planlingvoj pro tio ke ĝi importas multajn vortojn kaj gramatikajn elementojn de la ne-eŭropaj lingvoj, kaj samtempe ĝi estas tre natureca.

La eŭropa vortaro ludas ĉefan rolon en LdP, tial ĝi aspektas facila por la eŭropanoj. Tamen tio estus eraro konsideri ĝin kiel « eŭroklonon » (t.e. lingvo konstruita el pure eŭropaj elementoj). Ni kalkulas pri la interesiĝo de la parolantoj de la rusa, la ĉina, la hindia kaj la araba lingvoj.

La ideo de LdP estas humanisma : ni deziras ke ĝi katalizu la lingvan unuiĝon de la homaro.

Lingva de Planeta estas kreo de malgranda grupo de entuziasmoj de Sankt-Peterburgo. Ni esperas ke la LdP-komunumo kreskos, kaj ni invitas ĉiun interesulon veni al ni. Ni akceptas diskutadon kaj sugestojn.

Se tiu ĉi projekto interesas vin, vi povas kontakti nin per retpoŝto je l-d-p@inbox.ru aŭ konigi viajn ideojn, komentojn, aŭ sugesti novajn vortojn en nian blogo:

<http://community.livejournal.com/lingwadeplaneta/>  
<http://www.lingwadeplaneta.info/>

### **PATER NOSTER EN LDP**

Nuy patro kel es in skay!

Yuy nam gei santifi ba,  
yuy regia lai ba,  
yuy volia gei zwo ba  
in skay e arda!

Dai a nu pan kada dey  
e pardoni a nu nuy pekia,  
kom nu pardoni toy-las  
hu peki kontra nu.

Bu dukti nu inu temtia  
E mah shar wek!

### **SPRITAĴO**

Estas ne ŝerco sed unua premio en konkurso pri fotoĵoj de kuraĝo far armeaj bravuloj.



Mirinda ekzemplo de la kuraĝo de soldato

### **FRUA ANGLA BONIGAS FRANCAN**

La lernado de du fremdaj lingvoj ne troŝarĝas la elementnivelaĵajn lernantojn. Male, tiuj lastaj utiligas la unuan fremdan lingvon por sia akirado de la dua, laŭ la rezultoj de esploro de la svisa ŝtata fonduso por la scienca esploro (FNS). Tiel, la infanoj helvetiaj enlernejigitaj en centra Svislando kiuj komencis lerni anglan, poste lernas pli bone francan. La rezultoj de tiuj laboroj aperigas ke la antaŭaj lingvaj sciaĵoj utilas por la instruado de eksterlandaj lingvoj. Iu bona komprenado de skribita germana faciligas la lernadon tiel bone de angla kiel de franca. La infanoj kiuj hejme parolas aliajn lingvojn, profitas tiujn sciaĵojn, nome por la parolaj komprenadoj de la franca.

[http://www\\_snf.ch/F/NewsPool/Pages/mm\\_09Apr07.aspx](http://www_snf.ch/F/NewsPool/Pages/mm_09Apr07.aspx)

### **PRELEGO EN MULHAŬZO**

Sinjoro Yann Kerdiles, profesoro pri angla lingvo kaj dekanato de la universitato de Mulhaŭzo en Elzaso (Mulhouse, nordorienta Francio), okazigis prelegon en la librejo Bisey kun sekva temo: "La antaŭsciigita morto de angla lingvo kaj la tutmondiĝo de Esperanto". Tuj ekde la komenco, li asertis ke la angla ne estas vera lingvo, sed iu multo da dialektoj. Li emfazis la malsamajn parolmanierojn de la angla kiujn li nomis "dialektoj". La angla de ĉinoj, la angla uzata en kontrolturo, tiu uzata en Afriko, en Hindujo, ktp. De tie, la malfacileco kompreni sin reciproke (kompreni unu la alian). Nur kvarono da anglaj lingvanoj estas denaskuloj kiuj baldaŭ devos lerni la anglan aŭ la dialektojn de la aliaj lingvanoj por efektive povi interkompreniĝi. Antaŭsciigita morto okazos eble post 30 jaroj. Li finis sian prelegon reliefigante la nepran tempon por la lernado de la angla, 10 jaroj kaze de aziulo - dum unu jaro sufiĉas por Esperanto. Por esti pli multe bonefike, dum lernejttempo, ĉu oni ne povos dediĉi unu jaron al Esperanto?

Lucien Michaux elfrancigis artikolojn ambaŭ

### **VI IĜU ĴUVELO POST MORTO!**



Diamanto fabrikita per homaj cindroj

Nuntempe, anstataŭ eniri en tombejo aŭ esti kremaciata post morto, vi povos iĝi diamanto. Rinaldo Willy, preparolanto de svisa firmao Algordanza, anoncas pri traktado, monate averaĝe, de 50 funebraj skatoloj transformotaj en ĵuvelojn. El kremaciata kadavro fariĝeblas ĝis 3 kilogramoj de cindro, tamen duona kilogramo sufiĉas por fabriki unu diamanton. Tiamaniere ĉiu mortinto povas fariĝi ĝis 6 diamantoj disdoneblaj al la pluraj familianoj. La cindroj trapasas sinsekvajn procedojn fariĝante karbono, poste grafito, poste estas varmigita ĝis 1.700 gradoj Celsius dum procedo de ses semajnoj por transformiĝi en artefaritajn diamantojn. Simila procedo en la naturo daŭras plurajn miljarojn. Post fabrikado, diamanto estas tranĉata, fajlata, polurata, glatigata por esti uzota ĉirkaŭkole en kolĉeno aŭ kolringo. La kosto dependas de la pezo de la diamanto (de 0,25 ĝis 1 karato) kaj varias de 2.800 ĝis 10.600 eŭroj. Vivantoj translokiĝas kaj ŝanĝas loĝurbon pli ofte ol antaŭe kaj malfacile translokiĝas kune la tombojn de siaj amataj mortintoj aŭ malfacile konservas hejme iliajn cindrojn. Pro tio, diras Rinaldo Willy, diamanto homa pli oportunas ol enterigo kostanta entute 12.000 eŭrojn ekzemple en Germanio. Tia procedo estas pli kaj pli uzata nome en Hispanio, Rusio, Ukrainio, Usono, Svisio.

Cila Gonçalves, tradukis P.B.

### **UEA EN KONFERENCO ALTE**

Petra Smidéliusz el Hungario, universitate kvalifikita specialisto pri testado de lingvokonoj kaj kunlaboranto de Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, reprezentis UEA en la 36a

konferenco de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE), kiu okazis en Santiago de Compostela, Hispanio, de la 22a ĝis la 24a de aprilo.

Akorde kun la celoj de la komisiono de UEA pri la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), laŭ kiuj oni planas ellabori kaj akreditigi ekzamenistojn ĉe ALTE. Smidéliusz partoprenis en la laborgrupoj pri normigo de ekzamenoj por junaj gelernantoj (7-12 jaraj). Unu el la plej gravaj diskutoj temis pri diferencoj de lingvolernado kaj ekzameniĝo inter infanoj kaj plenkreskuloj. Ĉiuj konsentis, ke la indikiloj de KER-nivelejo estu ŝanĝitaj konsiderante la specifajn de infana lingvolernado. Oni pridiskutis kelkajn eblajn ŝanĝojn por fari la dokumenton pli ampleksa kaj multtavola. La partoprenantoj interŝanĝis informojn kaj ideojn ankaŭ pri ekzistantaj ekzamenoj por infanoj (pri la angla lingvo), uzablaj aŭ neuzablaj taskotipoj, kondiĉoj de la buŝa ekzameno, efiko de la ekzameno al infanoj kaj diferencoj inter diverslingvaj ekzamenoj. La konferenco estis konsiderata ankaŭ lingvopolitike grava evento. Alparolis ĝin Leonard Orban, EU-komisionano pri multlingvismo, kiu emfazis, ke la lingvolernado de eŭropaj infanoj havas grandan gravecon kaj sekve tre gravas la evoluigo de iliaj lertecoj kaj kompetentoj. La fakto, ke por EU multlingvismo estas celata trajto de eŭropanoj, ne malhelpis al Petra Smidéliusz ekinteresiĝi plurajn lingvistojn kaj kolegojn pri Esperanto kaj fieri raportoj pri niaj eksperimentoj, internaciaj spertinterŝanĝoj kaj interkulturaj edukebloj. La ekzisto de komuna lingvo, al ĉiu relative facile lernebla, ne montriĝis kontraŭa al multlingvismo, sed pluraj vidis en ĝi realan kaj atingeblan rimedon por ties efektivigo. Partopreno kaj kompetenta kunlaboro en la konferencoj de ALTE kontribuas al la akcepto de la internacia lingvo inter lingvistoj kaj lingvopedagogoj. Laŭ tiu linio UEA konsekvence plu laboros.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

## 30a MALFERMA TAGO

Programo	
Horo	Programero
10.30-11.00	Sono: Oreg: Novajoj en la Libroservo; Stano Maslak: Letumo de kunkaĵo de Esperanto
11.00-11.45	Anna Löwenstein: Rememoroj el la CO kaj virina agado de UEA
12.00-12.45	Juan Besada: (Mal)avantaĝoj de la Esperado en Kubo
13.00-13.30	Nederlanda Esperanto-Junularo sin prezentas
13.45-14.15	Johān kaj Svetlana Derks: Esperanto-pojnto en Afriko
14.30-15.15	Anna Löwenstein: Mir-verko aktivado
15.30-16.15	Hilroy: UK 1938 (Groet), UK 1959 (Gdansko), UK 1959 (Varsovio)
16.30-17.00	Nederlanda Esperanto-Junularo sin prezentas
14.00	Ekumenio laŭ la Konsura Europa Referendado (Buda partio)
10.00-17.00	Sakaro de esperantistoj
10.00-17.00	Tabatata vendado
10.00-17.00	Senpagaj kafaj tagoj

Anna Löwenstein, verkistino kaj membro de la Akademio de Esperanto, estis la ĉefpreleganto de la 30a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA kiu okazis sabate, la 25a de aprilo, kaj allogis 65 vizitantojn. La domo de UEA estis konata al Löwenstein jam de ŝia periodo kiel oficisto de UEA antaŭ trideko jaroj. Ŝi faris du prelegojn. En la unua ŝi rememoris pri tiu tempo kaj aparte pri la virina agado de UEA, kiu tiam estis tre aktiva. En la alia prelego ŝi parolis pri sia verkista aktivado, prezentante interalie sian novan historian romanon "Morto de artisto". Kun la movada vivo en la venontjara kongreslando konatigis Juan Besada el Kubo, kiu prelegis pri la historio kaj nuntempaj apartaĵoj de la tiea Esperanto-movado. La nederlanda esperantista paro Johan kaj Svetlana Derks rakontis pri sia jarkomenca instrua aktivado en Afriko kaj pri interesa projekto realigota en Burundo, pri kiu ili ricevis ideon dum sia vojaĝo. Douwe Beerda el Nederlanda Esperanto-Junularo prezentis la agadon de NEJ kaj viglan retejon pri homaj rajtoj <[www.homajrajtoj.org](http://www.homajrajtoj.org)>. Surpriza programero estis tri filmoj. Unu estis farita en la unua Internacia Junulara Kongreso en la nederlanda vilaĝo Groet en 1938, kie estis fondita Tutmonda Junulara Organizo, la posta TEJO. Du aliaj estis filmitaj de la brita esperantisto John Gbourne en IJK en Gdansko kaj UK en Varsovio en 1959. Gbourne donacis la originalajn 8-milimetrajn bendojn al UEA. La fondaĵo *Esperantic Studies*

Foundation subvenciis kaj organizis ilian kopiadon sur DVD.

La Libroservo vendis librojn k.a. varojn sume por 1307 eŭroj. Plej multnombro vendiĝis "La Asocio"(6 ekz.), artikolaro de Ziko van Dijk pri la historio de UEA, sekvata de "Morto de artisto" de Anna Löwenstein kaj la gvidlibro por KER-ekzamenoj "Esperanto de nivelo al nivelo" (po 5 ekz.), kaj la UEA-historio "Utila Estas Aliĝo" de Ulrich Lins (4 ekz.). La programeroj de la 30a Malferma Tago estas spekteblaj rete <[www.ipernity.com/home/97850](http://www.ipernity.com/home/97850)>. La venonta Malferma Tago de la Centra Oficejo okazos la 28an de novembro kaj estos dediĉita al la 100-a datreveno de prof. d-ro Ivo Lapenna. *Gazetaraj Komunikoj de UEA*

## ERINACO UZITA KIEL ARMILO



Erinaco

Viro en Nov-Zelando estas formale akuzita, ke li uzis erinaceton kiel armilon, laŭ raporto de la gazeto *New Zealand Herald*. La polico diris, ke William Singalargh, 27-jaraĝa, ĵetis la erinaceton al 15-jaraĝa knabo je distanco de 5 metroj. "Ĝi frapis la viktimon en la kruro, kaŭzante grandan, ruĝan vundon kaj kelkajn trapikajn markojn," laŭ la polico de la urbo Whakatane. Estis neklare ĉu la erinaco ankoraŭ vivis kiam ĝi estis ĵetinta, kvankam ĝi estis mortinta kiam ĝi estis kolektita kiel indico. La proparolanto de la polico diris, ke la suspektato estis "arestita pro atenco kun armilo, nome la erinaco." W. Singalargh ekiris antaŭ la tribunalo je la 17-a de aprilo. Se li estos juĝita kulpa, li alfrontos kvin jarojn da enprizonigo. *evente.net*

10

## LA FLANDRA LEONO

*Zij zullen hem niet temmen,  
Den fieren Vlaamschen Leeuw.*

Neniam kvietigos  
Leonon flandran vi;  
Li ĝuos liberecon,  
Neniam helpos kri'.  
Neniam kvietigos,  
Dum vivos ni, leon'  
Dum havos li ungegojn  
Kaj dentojn laŭ bezon'.

*Refreno:*

Neniam kvietigos,  
De Flandro la leon',  
Dum havos li ungegojn  
Kaj dentojn laŭ bezon'.

La temp' forglutas urbojn,  
Kaj falas iam tron',  
Sed ne pereos nia  
Popolo kun leon'.  
Almarŝas malamikoj,  
Minacas mort-furi',  
Ni ridas pri danĝeroj,  
Leono apud ni.

Batalas li jarmilon  
Por flandra kara sort',  
Kaj restas li potenca  
Kaj en juneca fort'.  
Pensante ke li svenis,  
Aliras vi kun mok',  
Minace kaj terure,  
Leviĝas li el lok'.

Kaj se intencas oni  
Per fals', perfid' en fin',  
Surprize lin ataki,  
Malliberigi lin,  
Atentas li pri ĉiu  
Suspekta via gest',  
Hirtigas kolhararon  
Kaj muĝas reĝa best'.

Sufiĉe da incitoj:

Jen venĝos potencul,  
Al malamik' li saltas  
Kun fajro en okul':  
Disŝiras li kaj rompas  
En la batal-furi',  
Per sango makulite,  
Triumfe muĝas li.

*Refreno:*

Neniam kvietigos,  
De Flandro la leon',  
Dum havos li ungegojn  
Kaj dentojn laŭ bezon'.

El H. J. van Peene, Flandrio  
Esperantigis Antoni Grabowski, Varsovio, Pollando

## FANTAZIA MEDITADO

Miaj pensoj, iras al vento;  
miaj vortoj, al la papero;  
mia imago, al la espero;  
mia muziko, al silento.

Ankaŭ, mia spirita sento,  
iras tra montaroj kaj maro,  
flugante kiel stelero,  
ĝis via brulanta animo,  
kie mia revo senlumo  
fandiĝas kiel Ikaro.

Sekvos sen mi la vivo,  
sed mi ne estos konscia  
de kiel estos l'postvivo  
postmorta foriro mia.

Sekvos sen mi la vivo;  
kaj, mia finita konscio  
falos post la vivo-drivo,  
al la vakua nenio.

Sekvos sen mi la vivo!!!  
Alberto Garcia Orive, Bilbao, Hispanujo

## DEZIROJ

Mi volas esti magnolia arbo  
ĉiu majo flori  
najtingalo mi volas esti  
kun dolĉa voĉo

aŭ monto  
de la suno ĉirkaŭbrakita  
pure lavita de la pluvo  
senfina pintorigardo  
miljarojvivo

Ne  
neniu magnolia arbo mi volas esti  
neniu najtingalo  
ankaŭ neniu monto

Mi volas esti mi  
ami homojn  
sekvi mondspurojn  
kaj se la lingva spirito permesas  
kun kelkaj vortoj  
travivi mian morton  
Wünsche de Rose Auslander  
elgermanigis Christiane Oetter

## PAPRIKOJ, KAPSIKOJ KAJ PIMENTOJ

Verŝajne mi ne estas la sola esperantisto, kiu estas iom konfuzita pri la diferenco inter paprikoj kaj kapsikoj, por ne menciigi la diversajn tre piprajn spicaĵojn produktitajn el iliaj semoj.

Papriko laŭ PIV estas “**Maturaj fruktoj de du specioj de kapsiko (*Capsicum anuum kaj Capsicum longum*)**”, kaj povas rilati ankaŭ al pulvoro farita el tiu sama frukto, kiam ĝi estas sekigita. Kapsiko, aliflanke estas pli vasta termino, kiu entenas ne nur paprikojn, sed ankaŭ la specion *capsicum baccatum*, uzatan por la produktado de kajena pipro.

Se oni rigardas en PV, aliflanke, oni trovas alian bildon. (Ne la unuan fojon mi rimarkas malkonkordon inter la du vortaroj, sed la ŝanĝoj faritaj en PIV ne nepre plibonigas la situacion.) Laŭ PV, kapsiko estas “**Genro de solanacoj, kies frukto estas uzata kiel spicaĵo (*capsicum*)**”, dum papriko estas “**Frukto pulvorigita de kapsiko (= ruĝa pipro)**”.

Eicholz en sia Esperanta bildvortaro ŝajnas sekvi PV, ĉar laŭ li la legomo nomiĝas kapsiko, kaj li aldonas en krampoj “**se pulvorigita: papriko**”.

Rilate al la diversaj specoj de ruĝa pipro farita el la semoj de tiu planto, mi trovis la plej klaran klarigon en angla kuirlibro de Elizabeth David: *Spices, Salt and Aromatics in the English Kitchen*. Laŭ ŝi, nur du specoj de kapsikoj, *capsicum minimum* kaj *capsicum frutescens* estas fontoj de la vera kajena pipro, dum paprika pulvoro venas de la muelitaj semoj de *capsicum anuum*. Ŝi avertas, ke oni ne anstataŭigu paprikan pulvoron per kajena pipro, aŭ inverse.



Anna Lowenstein, brile prelegante je la 25a de aprilo 2009, en la Roterdama Centra Oficejo de UEA, dum la Malferma Tago.

11

La ruĝa pipro uzata en hindaj manĝaĵoj, laŭ E. David, povas esti mikso de pluraj variaĵoj. Ŝi ankaŭ donas la interesan informon, ke tiu spicaĵo, kiun oni nun konsideras esenca ingredienco de kareo, estis nekonata en Hindujo antaŭ la 16a jarcento, kiam kapsiketoj estis enkondukataj el Ameriko.

Leginte ĉion ĉi, mi proponas, ke la grandaj ruĝaj, flavaj kaj verdaj fruktoj nomiĝu kapsiko, dum la spicaĵo farita el iliaj semoj kaj uzata precipe en la hungara kuirarto estas papriko. La tre pikaj malgrandaj kapsikoj eventuale estu kapsiketoj, dum la ekstreme forta pulvoro farita el iliaj semoj, kaj uzata en sudamerikaj kaj hindaj manĝaĵoj, estas kajena pipro.

Rilate al ruĝa pipro, kaj PV kaj PIV ŝajnas konsideri ĝin sinonimo de papriko, sed ne de kajena pipro. Tio ŝajnas al mi iom mallogika, kaj fonto de eventuala konfuzo. Laŭ mi, oni uzu ĝin por ambaŭ, sed oni memoru, ke en receptoj necesas pli preciza termino.

Tio solvas la problemon pri kapsiko kaj papriko, sed nun, kion ni diru pri pimento, kiun en *Grand dictionnaire français-esperanto* oni erare prezentas kiel alternativan nomon de la kapsiko? Fakte, en la franca kaj la hispana oni uzas similan vorton, sed en Esperanto ĝi rilatas al tute alia planto: *pimenta officinalis* aŭ *eugenia pimenta*, “**kies preskaŭ globformaj, apenaŭ pizograndaj, nematuraj kaj sekigitaj fruktoj estas uzataj kiel spicaĵo**” (PIV). Tiu spicaĵo havas guston iom similan al miksaĵo de kariofiloj, muskato, cinamo kaj pipro. Tial en la franca kaj la angla ĝi nomiĝas, laŭvorte, “ĉiuj-spicaĵoj”, kaj en la itala kaj la franca ĝi ankaŭ nomiĝas “**jamaika pipro**”.

Anna Lowenstein, akademianino

## GENTA PROMENADO

“La Progreso”, Genta Esperanto Klubo, en Flandrio, organizas serĉpromenadon dum Pentekosta semajnfino, sabate la 30a de majo, kun rendevuloko en la urba centro, kiel kutime, je la 14a horo. Vi vidu la interretan hejmpaĝon de menciata klubo:

<http://www.esperanto.be/gent/>

12

## MIA ESPERANTISTECO (dua parto)

Kiam mi forlasis la urbon Rionegro, kaj translokiĝis al alia, sed egale franciskana Seminario, tiam trafis nin la vizito de nekonato, kiu volis koni nian novan Seminarion en Agudo, urbo de la ŝtato Sankt-Paŭlo. Tute hazarde, kaj certe tute malhazarde, ĉar fataldestine, en nia konversado aperis aludo al Esperanto, kaj li estis mem esperantisto! Laŭro li estis, kaj lia ĉeesto malfermis por mi la vastan vojon al Esperanto per la simpla indiko de la adreso de Ismael Gomes Braga, ĝis nun memorata de mi: Rua Ramon Franco, 64. Urca, Rio de Janeiro RJ.

Kaj pardonu min, sed venas alia digresio priteksta. Post la nomo de Ismael (tian skribon li preferis en siaj verdaj laboroj!), mi skribis unue: “... kiun ĝis nun mi ne forgesis”.

Tion tamen mi sentis ambigua kaj polisemia, vere nur dusemia: 1. Mi ne forgesis ĝin. 2. Mi ne forgesis lin. Mi do forviŝis tian dusemcon kaj enskribis alian: ... ĝis nun memorata de mi. Kaj efektive mi enskribis alian dusemcon, kiun nur nelge (simpla mallongigo de la vorto nelonge) (2) mi rekonis.

(2) *Noto: Antaŭ nelonge, nun jam vortarita. Unua spuro: en la unua eldono de Parnasa Gvidlibro, de K. Kalocsay, G. Warin ĝien kaj R. Bernard. Dua spuro en la dua eldono, p. 157: Varsovio: Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun Heroldo de Esperanto, 1968. 160 p. Tria spuro, p. 779: La Nova Ilustrita Vortaro de Esperanto. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 2002. 1265 p.*

Miaj kunlegantoj bonvolu do restarigi la unusencecon per la sekvanta substituota varianto: ... kies figuron kaj adreson mi neniam forgesis.

En tiu sama tago mi skribis leteron al S-ro Ismael, kaj post kelka hezito enmetis unu el miaj lastaj poeziaĵoj, en kiuj svarmas multaj esperantigitaj portugalaĵaj vortoj: mi havis pli da ideoj ol da verdaj vortoj... La respondo venis akurate kun laŭdoj kaj mallaŭdoj, sed mi mensogas: ne mallaŭdoj, sed korektoj!

Kompreneble, la leteron mi ricevis malfermita, ĉar la malfermo de pakoj kaj leteroj estis tradicio seminaria por evito de estontaj pekoj per estontaj volovekoj. Lian leteron mi legis vekita kaj dormanta, ĉar mi ĝin lasis sub mia kapkuseno. Kaj skribis alian. Kaj venis alia respondo akurata. Malfermita koverto. Kaj mi ĝin legis vekita kaj dormanta. Kaj skribis alian. Kaj venis respondo akurata. Fermita koverto. Kial malfermi la koverton, se Frato Rejnaldo restis en Rionegro, kaj nur Frato Tadeo venis kun ni al Agudo? Tio estis mia unua materia ĝojo per Esperanto: ricevi de la pastroj ne kontrolitan leteron. Frato Tadeo estis sanktulo. Du pruvojn mi havas pri tio. En unu el mia vizito al lia studo ĉambro, mi vidis, ke li skribas per duonrompita plumo, kiu lasas terurajn strekojn kaj malstrekojn sur la linio. Mi do demandis lin:

- Frato Tadeo, kial vi ne prenas alian plumon?

Li respondis plene kaj solene:

- Geraldo, mi votis obeemon, ĉastecon kaj malriĉecon. Pro tiu tria, mi ne petas de mia superulo alian plumon. Li ĝin donos al mi, kiam li vidos, kian kakografion mi skribas...

La tagman.o kaj la vespermanĝo ĉe la Seminario estis ĉiam vastaj kaj balastaj kaj tute ne fastaj eĉ en vendredoj kaj en tagoj de la Sankta Semajno: ni estis junaj, kaj ni devis bone disvolviĝi... Estis foje tamen sako da fazeolo, kiu estis aĉetita sen testo kaj atesto: vermita.

Dum tuta semajno, neniu el la seminarianoj prenis el la poto ian porcion da fazeolo, sed restis kontentaj pri la rizo, la makaronio, la viando, la terpomo kaj la salato. Sed ne li, Frato Tadeo... Serenmiene, li prenis la kvanton de ĉiu alia tago, miksis ĝin kun rizo. Kaj mangis!... Ekzemplodona sanktulo!

Mia interleterado kun Ismael daŭris tri jarojn: venis leteroj kaj venis pakoj, venis konsiloj kaj konsoloj, venis prelegoj kaj prologoj, kaj mi kulpas min, ke ĉio estas perdita de mia preteratento. En unu el liaj leteroj estis tamen ordono, kiun mi

malobeis. Mi verkis la poemon La Orfo, por kiu mi adaptis la strukturon de la novelo La Milda Miraklo, de Jose Maria de Eça de Queirós (1845-1900), kaj tiu de la poemo La Larmo, de Abilio Manuel Guerra Junqueiro (1850-1923), ambaŭ bonegaj kaj ĝis nun legataj verkistoj (3) de la portugala literaturo.

(3) *Noto: La unua estas eksterordinara romanisto, kies sola difekto konsistas en tio, ke li verkis portugallingve. Li estis sufiĉe ksenofobia por diri: Alilandan lingvon ni devas paroli fiere malbone. Li tamen parolis la francan perfekte... La dua estas konata per sia feroca antiklerikalismo, sed liaj poemoj estas superbelaj kaj superemociaj. Kaj venis nun al mi en la kapon la ideo publikigi la tradukon de la du cititaj verkoj krom mia La Orfo por paroli pri tekstostrukturo (ho kiom toa langorompa vorto: kvinjambo kaj deksilabo!). Ĉu vi ĝin publikigos, Gersi?*

Leginte mian poemon, Iŝmael konsilis min per la sekvantaj vortoj:

- Geraldo, rompu vian plumon, ĉar neniam plu vi verkos ion pli bonan kaj pli belan.

Mi ne rompis, kaj plu verkis, kaj neniam mi kuraĝis aperigi tiun poemon en unu el miaj pluraj verdaj libroj. Gersi maltemis en unu el la fontoj de FONTO.

En la fino de la tria jaro en Agudo (1950-1952), mi estis aprobata en la lasta jaro de la kolegja kurso, kaj decidis iri for de la Seminario kaj ne paŝti, sed patriĝi (ne unua motivo). Verŝajne puŝis min for mia unua poemeto en Esperanto, kiu estis simpla aranĝo de miaj unuaj lernitaj vortoj:

Ci	Kaj	Mi.
Mi	Kun	Ci.
Ni	Kaj	Nun:
Ni	Kun	Gaj'...

Plej verŝajne, tiu poemeto havas nenion komunan kun mia posta retiriĝo, kaj tiu dua persono estus nur la amo al Dio... Restas tamen la fakto, ke mi forlasis unu matenon mian dekjaran hejmon (1943-1952) en tri seminarioj franciskanaj, feriis dum semajno, kaj alvenis poste frumatene al Rio de Janeiro, el kiu mi devis iri al mia familio en apuda domurbeto - tiam kaj nun ne tiom

dormourbo: la sepa plej riĉa en Brazilo. Ili ne atendis min, miaj familianoj, ĉar mi informis nur, ke mi foriras, kaj vojaĝas kun amiko sur la plaĝon por semajna ripozo en la grava havenurbo Santo, de ŝtato Sankt-Paŭlo.

*Alia interkrampa teksto: se la portugalaj Atenas kaj Marrocos estas la verdaj Ateno kaj Maroko, evidente la portugalaj Agudos kaj Santos devas esti Agudo kaj Santo.*

Efektive, tien mi vojaĝis kun Laŭro, la unua homo, kiu parolis al mi pri Esperanto, sed ne en Esperanto. Li havis domon kun putro el sulfura akvo, kiu rapide forigis la veziketojn, kiujn li havis sur la vango pro la ĉiutaga razado, kaj mi ĝin gustumis (la sulfuran akvon, ne la razadon) samtempe la unuan kaj la lastan fojon... kiel ĉiu kuracilo malbongusta kaj eĉ naŭza. El tie fine Rion.

Spite de la frua horo, la stacidomo estis plena. Jam en tiu epoko Rio estis plurmiliona urbo! Kaj mi direktis min al mia buso, kiam subita penso invadis mian kapon:

- Kial ne iri al Iŝmael? Li ja jam vekigis, ĉar la karioka (karioka=loĝanto de Rio de Janeiro) varmo delogas la kariokojn de la lito sufiĉe frue... Mi do tien! Tramo portis min al Urka, la kvartalo, en kiu li loĝas. Alveninte, mi rigardis al la duetaĝa domo, kaj vidis ĝin tute lumigita: almenaŭ li estos vekita, kiam mi frapos ĉe lia pordo! Post ioma sendecideco, mi transiris la Rubikonon sen scii, ke mi ĝin transiris: mi frapis ĉe li... per premeto rapida kaj senavida.

Li ŝajne staris post la pordo atende al mia frapeto: la pordo malfermiĝis. Kaj mi vidis mezaltan homon en la paso de la sesdekaj kun bela kaj longa hararo tute nekutima en tiuj rigidaj jaroj, en kiuj longaj haroj akordis nur kun virinoj. Kaj dum mi spektis al li, li prenis kombilon kaj kombis siajn longajn nigrajn harojn. Mi tiam rekonsciiĝis, kaj diris al li kun tremanta voĉo:

- Mi estas Geraldo Mattos. Ni...

Mi volis aldoni, ke ni korespondis dum la lastaj tri jaroj, sed ne estis tempo por tio, ĉar li brakumis min kiel patro brakumus

filon post longa forestado. Kaj kondukis min supren laŭ ligna kurba ŝtuparo al sia skribo ĉambro. Li parolis, kaj mi respondis. Mi parolis, kaj li respondis. Kaj la tempo pasis. Mi do diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi devas danki vin por viaj leteroj kaj por via amika akcepto. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi matenmanĝos kun mi.

Ni desupris, trapasis ĉambreton, kaj eniris en la antaŭkuirejon, kie li interpretis sian edzinon kaj min. La matenmanĝo komenciĝis, daŭriĝis kaj finiĝis. Kaj ni alsupris al lia skriboĉambro. Tri horojn poste, mi diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi devas denove danki vin por viaj leteroj, por via amika akcepto kaj por via bongusta matenman.o. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi tagmanĝos kun mi.

Post kelkaj minutoj, ni desupris, trapasis ĉambreton, kaj eniris en la antaŭkuirejon, kie jam estis lia edzino kaj staranta servistino. La tagmanĝo komenciĝis, daŭriĝis kaj finiĝis. Kaj ni alsupris al lia skribo.ambro. Kvar horojn poste, mi diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi deemas denoove danki vin por viaj leteroj, por via amika

akcepto, por via bongusta matenmanĝo kaj por via multmanĝiga tagmanĝo. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi lunĉos kun mi.

Post kelkaj minutoj, ni desupris, trapasis ĉambreton, kaj eniris en la antaŭkuirejon, kie

jam estis lia edzino kaj staranta servistino. La lunĉo komenciĝis, daŭriĝis kaj finiĝis. Kaj ni alsupris al lia skriboĉambro. Tri horojn poste, mi diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi deemas denoove danki vin por viaj leteroj, por via amika akcepto, por via bongusta matenman.o, por via multmanĝiga tagmanĝo kaj por via apetitiva lunĉo. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi noktomanĝos kun mi.

Post kelkaj minutoj, ni desupris, trapasis ĉambreton, kaj eniris en la antaŭkuirejon, kie jam estis lia edzino kaj staranta servistino. La noktomanĝo komenciĝis, daŭriĝis kaj finiĝis. Kaj ni alsupris al lia skriboĉambro. Du horojn poste, mi diris al li:

- Pardonu min, sed nun mi deemas denoove danki vin por viaj leteroj, por via amika akcepto, por via bongusta matenmanĝo, por via multmanĝiga tagmanĝo, por via apetitiva lunĉo kaj por via realtabligebla noktomanĝo. Mi iras nun al la miaj.

Li ridis, kaj neis:

- Ne. Vi de nun loĝos kun mi.

Kaj li difinis por mi ĉambron, en kiu mi dormis, kaj sonĝis pri paradizo.

La sekvantan matenon, mi adiaŭis lin kaj lian edzinon, kaj promesis reveni du tagojn poste. Mia sola valizo jam restis ĉe li, krom kelkaj vestaĵoj portataj por du tagoj.

Kiam mi revenis du tagojn poste en la komenco de la mateno, li transdonis al mi sian unuan donacon en sia domo: monujon kun sufiĉe da mono por du monatoj... Kaj ĉe li kaj lia edzino mi restis dum dek kvin monatoj, ĝis mi edziĝis al la esperantistino Daisy Angelina kontraŭ la volo de Iŝmael, kiu longe skribis al ŝi, kaj nur post la sendo de la letero legigis ĝin al mi. Resume, li diris, ke mi estas poeto, havos multajn virinojn, kaj do estos malbona edzo.

Li pravis. Ŝi tamen donis al mi kvar magiajn infanojn: Ludovikon (neniu povas imagi, kial tia estis la nomo de mia unua filo), Frederikon, Rikardon kaj Karlan. Mia unua intenco estis nomi ŝin Klara (neniu esperantisto divenas, kial...), sed ŝi venis bruna, kaj mi do nur interŝanĝis la mezajn literojn... Pro tiu unua nomo donita al mia plej aĝa filo, mi nun estas patro de kvar ko-filoj kaj avo de sep ko-nepoj. Krome, ĉar nun mi estas jam antaŭpatro, la komenco de marto vidos mian kvinan ko-infanon, kiun mi esperas ko-filino... [Viktor estas tiu mia kvina ko-filo: 19.02.2004]... daŭrigota

### MALKONTENTO ĈE McDONALDS

Strikantoj intencas bruligi figuraĵon de la kompanio klaŭno Ronald McDonald dum stratprotesto ekster la nacia konferenco de la kompanio en Auckland, Novzelando. Laboristoj el 3 restoracioj en Auckland kaj Hamilton koleriĝas pri malgrandaj salajroj kaj manko da certaj laborhoroj. Se la estroj de McD ne respektas dungitojn, la fajro de

Ronald McDonald estos la komenco de longa, varma batalo, kaj ĉiu semajne, laboristoj ĉe alia restoracio strikos. Ĉiutage ni aŭdas novajn hororrakontojn kaj pli da laboristoj aniĝas sindikaton "Unite". Mark Hawthorne, estro de McDonalds Novzelando, asertis, ke la kompanio daŭre negocis de februaro, kiam "Unite" rompis promeson pri kolektiva dungado kunsento. [www.labourstart.org/eo/](http://www.labourstart.org/eo/)



### JAN AMADORI



Estonta kasisto de EBG,  
formalaj procedoj de la estraro devas anstataŭigi Claude Glady laŭ sia peto pro translokiĝo kaj ekloĝiĝo en Cerfontaine.